

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II^a : FEBRUARO 1922

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Krom oficiala organo de la

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

ĝi estas vera

LITERATURA REVUO

tute laŭfundamenta, organo de la

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Sur ĝiaj paĝoj aperas la verkoj premiitaj en tiaj konkursoj kaj bonegaj tradukoj el la kataluna literaturo.

Jarabono : **5 pesetoj**

Redakcio kaj Administracio :

CARME, 30 — BARCELONA



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : Jaime Grau Casas

El la Lingva Komitato

DEPOST la reorganizo de niaj lingvaj institucioj, aperis «Deklaracio de la Akademio» kun «Difino kaj devoj de la Esperantistaro» kaj «Difino kaj devoj de la Lingvaj Institucioj»; Unua kaj Dua cirkulero de la Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, S-ro E. Grosjean-Maupin; Unua kaj Dua cirkulero de la Direktoro de la Akademia Sekcio por la Scienca kaj Teknika Vortaro, D-ro Pierre Corret; Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, S-ro Th. Cart.

Nur parte ni povis raporti pri tiaj dokumentoj, kiuj montras la gravan kaj seriozan laboron entreprenitan.

Hodiaŭ ni ĝojas represi aliloke kelkajn trafajn vortojn de S-ro Cart, pri la neceso de plena respekto al nia lingvo, ŝajne ne bone konsciata de ĉiuj samideanoj.

Baldaŭ aperos : (1) Tria Aldono al la Universala Vortaro. — (2) Plena listo de Oficialaj Vortoj (sen traduko). — (3) Listo de propre esperantaj Radikoj (kun fr. a.ŝl. germ. tradukoj). — (4) Korespondencoj de la eraraj tradukoj de Universala Vortaro.

Principdeklaro



GN la nuna periodo ni, Esperantistoj, devas ĉion konsideri el propaganda kaj instrua vidpunkto.

Tia estu nia kondutregulo, ĝis kiam la Registaroj *oficiale* akceptos Esperanton kaj ĝin *oficiale* enkondukos en la lernejojn.

Grava eraro estus opinii, ke pli facile, pli rapide tion ili faros, se ni unue konsentas pri kelkaj reformoj: Francio, anstataŭ Francujo, plena aŭ parta forigo de l' akuzativo, neŝanĝebleco de l' adjektivo, *per* anstataŭ *de* post pasivo, k. t. p.

Uzante nian Zamenhofan lingvon, montrante al ĉiuj, eĉ al la skeptikuloj, ĝian plenan taŭgecon *en ĝia nuna formo*, ni iros al la venko; sed, se ni *mem* kredigas, ke ĝi bezonas unue kelkajn «pli-bonigojn (?)», ni detruos la *konfidon* kaj pereigos nian tutan aferon.

Ni do simple uzu nian Esperanton. Ni ne perdu nian tempon kaj nian forton, diskutante aŭ kritikante ĝin.

* * *

Esperanto nin ĉiujn superas, kaj nia sola gloro estas modeste labori por ĝia estonta triumfo, kiun ni eble ne ĝisvivos, sed certigos, en necesa persona sinforĝeso, nur per nia *konkordo* ĉirkaŭ komuna programo: *Plena respekto al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamenhof, por ke ni ĝin disvastigu senlace en la tutan mondon al pli alta celol*

TH. CART

Prezidanto de la Lingva Komitato



Zamenhofaj vortoj

PRI UNUECO

Per unueco ni pli malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune (Krakow, 1912).

Ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj aŭ gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en *plej severa unueco*, por ke ni akiru por nia afero la *konfidon* de la mondo (Cirk. Letero, 1908).

PRI NATURA EVOLUCIO

Volapuk pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis : absoluta manko de natura evoluipovo (Antwerpen, 1911).

Lingvo, kiu devas tratabi al si la vojon per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de *natura evolucio*; sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per *kontraŭnatura* kaj danĝeriga vojo de *revolucio* (Cirk. Letero, 1908).

PRI LA LINGVA KOMITATO

Ĉar la Lingva Komitato ĝis nun faris ankoraŭ neniun rompon en la lingvo, tial la reformistoj ĝin kulpigas, ke ĝi estas senviva, senforta, senaŭtoritata, sentaŭga (Cirk. Letero, 1908).

Pli bone estas, ke la Komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povus malutili al nia tuta afero (Dresden, 1908).

L. L. ZAMENHOF

Roberto, reĝo de Sicilio

poemo de Henry Wadsworth Longfellow

Roberto, Reĝ' de Sicilio (frato de Pap' Urbano, ankaŭ de Valmondo, de Germanujo la Imperiestro), vestita lukse per belegaj roboj, kun sekvantar' el multaj kavaliroj, je antaŭtago de Johano Sankta, fiere sidis ĉe diserv' vespera, dum pastroj kantis la *Magnificat*. Kaj aŭskultante, jen kaj jen denove li aŭdis vortojn ofte ripetatajn, kiel rekant' : *Deposuit potentes de sede, et exaltavit humiles*. Li levis malrapide reĝan kapon, kaj al klerulo apud li demandis: «Kion signifas tiuj vortoj?» Taŭĝe respondis la klerulo : «Li demetis de seĝo potenculojn, kaj altigis la humilulojn». Sekve Reĝ' Roberto murmuris malestime : «Estas bone, ke nur de pastroj kaj latinalingve kantiĝas tiaj vortoj ribeligaj : ĉar sciu la popolo kaj la pastroj, ne estas potenco kiu povas min puŝi for de mia reĝa trono». Sin apoginte, li oscedis, dormis, lulate de la kanto monotona.

Kiam vekigis li, jam venis nokto; senhoma la preĝejo, kaj senluma escepte kie la malmultaj lampoj briletis antaŭ la sanktulstatuoj. Li sin eklevis, kaj rigardis ĉien, neniun vidis, kaj nenion aŭdis. Li trovis pordon; ĝi ŝlosita estis. Kriegis li, aŭskultis, pordon frapis; minacis li terure, kaj plendegis, kaj eĉ malbenis homojn kaj sanktulojn.

De muroj kaj tegment' la sono eĥis, kvazaŭ mortintaj pastroj lin mokridus!

Sakristian', post longe jam aŭdinte la bruon de frapado kaj kriado, kredante, ke ŝtelistoj sin enrudis en la preĝejon, venis kun lanterno, kriante : «Kiu estas?» Reĝ' Roberto, duonsufokigante pro kolero, kriis : «Jen mi, la Reĝo! Ĉu vi timas?» Sakristian' murmuris kun malbeno : «Ĉi tiu estas vaga ebriuo» : ŝlosilon turnis li, malfermis pordon; per unu paŝ' lin preterkuris viro, mortpala, duonnuda, sen ĉapelo, kiu nek lin rigardis, nek parolis, sed saltis en la nigran noktmallumon, kaj malaperis kvazaŭ nur fantomo.

Roberto, Reĝ' de Sicilio, frato de Pap' Urbano, ankaŭ de Valmondo, de Germanujo la Imperiestro, je sia luksa vesto senigita, nudkapa, kotkovrita, kaj senspira, kun furioza sento pri insulto, antaŭen paŝis; tondrefrapis pordon de la palaco; kuris tra la korto; kolere ŝovis dekstren kaj maldekstren paĝiojn kaj servistojn; kaj rapidis sur la ŝtuparo supren, palvizaĝa kvazaŭ kadavro sub la torĉa brilo. De hal' al halo pasis li senspire; voĉojn kaj kriojn aŭdis, ne atentis; ĝis fine li atingis festenĉambron, kun flama lumo kaj odoroj ravaj. Jen sidis sur estrado reĝ' alia, portante liajn robojn, lian kronon,

Roberto mem laŭ form', vizaĝ', grandeco,
sed transformita per anĝela lumo.
Estis Anĝelo, kaj ĉeesto lia
per dia lum' plenigis la aeron;
altec', trapanetranta ekstersajnon,
kvankam l' Anĝelon ne ekkonis iu.

Momenton muta, forte mirigata,
sentrona Reg' rigardis la Anĝelon,
kiu respondis al kolero lia
per la kompato dia de l' okuloj,
kaj poste diris: «Kiu estas vi?
Kaj kial vi ĉi tien venas? Diru».
Respondis Reg' Roberto kun rikano:
«Mi estas Reg', kaj venas por pretendi
la rajton mian kontraŭ vi, trompisto,
kiu uzurpas mian reĝan tronon».
Subite, je la malrespektaj vortoj,
eksaltis la koleraj gastoj, tiris
el ingoj siajn glavojn. La Anĝelo
respondis kun trankvila sereneco:
«Ne Reĝo vi, sed arleken' de Reĝo.
De nun vi pelerinon krenelitan
portadu, kun tintiloj; kaj konduku
simion kiel vian konsilanton.
De nun vi servu al servistoj miaj,
kaj kiam ili vokos, vi obeu».

Ne atentante la minacojn, petojn
de Reĝ' Roberto, oni lin forŝovis
for de l' festena ĉambro, kaj malsupren
sur la ŝtupar'. Paĝioj antaŭkuris,
ridante lin; dum malfermigis larĝe
la pordo, lia koro ektimegis,
ĉar aŭdis li de armituloj ridon
tumultan, kaj plafonojn ree eĥi
per moka krio: «Vivu, vivu Reĝo!»

Morgaŭon en mateno, vekiginte
kiam la sun' unue ekradiis,
li pensis en si mem: «Jen estis sonĝo!»
Sed kiam li la kapon turnis, pajlo
susuris; apud sia lit' li vidis
ĉapelon kaj tintilojn arlekenajn.

Ĉirkaŭis lin la grizigintaj muroj;
ĉevaloj apudstaris en la staloj;
kaj en angulo, dentojn kunklakante,
tremante sidis la simi' mizera.
Ne estis sonĝo—lia mond' amata
por li ŝanĝiĝis jam en polvon, cindron!

Pasadis tagoj; kaj al Sicilio
revenis jam antikva reg' Saturna. (1)
Sub la estreco bona de l' Anĝelo,
per gren' kaj vin' gajiĝis la insulo;
profunde en brulanta Brust' de l' monto
Giganto Encelad' (2) trankvile kuŝis.
Roberto dume cedis al la sorto,
silenta, senkonsola, malafabla.
Vestita per la arlekena vesto,
konfuza laŭ mieno kaj rigardo,
razita kiel estas la monaĥoj,
mokata de paĝioj, korteganoj;
amiko sola estis la simio,
nutraĵo sola, tio forlasita
de aliuloj; tamen li ankoraŭ
nesubigita restis. Kiam foje
renkontis lin survoje la Anĝelo,
kaj, duonserce, duonserioze,
demandis lin severe, kvankam milde,
por ke li sentu, ke velura ingo
entenas ŝtalan glavon: «Ĉu vi estas
la Reĝo?», lia malĝojeg' pasia
elŝprucis kvazaŭ superflu' senhalta;
kaj, altlevante frunton, li respondis
fiere, akre; «Mi ja estas Reĝo!»

(1) Laŭ antikva kredo, la epoko,
en kiu Saturno, patro de Jupitero, regis
en Italujo, estis la «Ora Epoko», t. e.
plena de paco kaj prospero.

(2) Laŭ latina fabelo, Encelado
estis giganto malliberigita en la monto
Etno pro tio ke li ribelis kontraŭ Jupite-
ro. Oni supozis, ke la erupcioj de la vul-
kano estas kaŭzitaj de la penegoj de
Encelado por liberigi sin. La poeto
Longfellow verkis alian poemon pri tiu
temo.

Jam pasis jaroj preskaŭ tri; alvenis ambasadoroj kun renomo fama, el Germanujo, de l'Imperiestro al Reĝ' Robert', dirante ke la Papo letere vokis ilin tuj ekiri por lin viziti en la urbo Romo je Sankta Ĵaŭdo. Ĝoje la Anĝelo akceptis siajn gastojn; kaj donacis broditajn vestojn, kaj velurmantelojn kun la subŝtofo el ermeno luksa, kaj ringojn kaj juvelojn multekostajn. Kun ili poste li vojaĝis mare en la belegan landon Italujon, de kiu la beleco plibriliĝis per nura paso de la rajdantaro, kun plumoj, kaj manteloj, kaj broditaj ĉevalvestaĵoj, kaj movad' de bridoj juvelkovritaj kaj de oraj spronoj. Kaj jen, inter servistoj, mokparade, sur ĉevalaĉ' kun trenmarŝmaniero, portante vulpajn vostojn ventblovatajn, la Reĝ' Roberto rajdis, kun simio post li sidanta seriozmiene, kaŭzante gajegecon en la urboj tra kiuj ili pasis. Pap' Urbano akceptis ilin kun grandega pompo kaj bruo de trumpetoj, en la Placo de Sankta Petro; kaj la benon faris kaj ĉirkaŭpremon kun fervor' al ili. Dum li kun preĝoj kaj kun gratuladoj gastigis la Anĝelon, nesciante, Robert' la Arlekeno, sin ŝovante tra la amaso, alkuregis ilin, kaj laŭte kriis: «Mi, mi estas Reĝo!» Rigardu, kaj en mi rekonu fraton. Roberto mi! la Reĝ' de Sicilio! Ĉi tiu viro, kiu min similas, trompanto estas en la vest' de Reĝo. Ĉu vi ne konas min? Ĉu voĉ' interna ne min respondas, tion konfesante, ke ni parencaj estas?» Jen la Papo, silenta, kun mieno maltrankvila, rigardis la vizaĝon de l'Anĝelo. Sed la Imperiestro ride diris:

«Jen stranga ludo, havi frenezulon en la kortego kiel arlekenon!» La kompatinda arleken', venkite, en la amason estis forŝovita.

Solene pasis la Semajno Sankta, kaj Paska Tago brilis sur ĉielo. Ĉeesto de l' Anĝelo, brile luma, antaŭ la sunleviĝ' heligis Romon; kaj homajn korojn nove fervorigis per sent' ke Kristo releviĝis vere. Eĉ Arleken', sur sia pajla lito, la nekutiman belegecon vidis. Interne sentis li potencon novan, ankoraŭ ne sentitan; kaj humile genuis li sur sia ĉambra planko, kaj susurantajn vestojn de l' Sinjoro li aŭdis pasi tra l' aer' ĉielen.

Finiĝis jam vizito, kaj denove Valmondo iris al la bord' Danuba. Vojaĝis hejmen la Anĝel', kaj ree la land' beliĝis per sekvantoj liaj, rajdantaj pompe tra italaj urboj ĝis la haven' Salerno, kaj de tie sur maro. Kiam li sin trovis ree en urb' Palermo, kaj sidigis sin sur trono en la granda festoĉambro, kaj l' *Angelus* li aŭdis el la turoj de monaĥejoj, kvazaŭ mond' pli bona interparolas dolĉe kun la nia, li mane signis al la Reĝ' Roberto, ke li alproksimiĝu, kaj per gesto ordonis ke foriru la ceteraj. Kaj kiam ili restis solaj, diris Anĝelo: «Ĉu vi vere estas Reĝo?» Klinante kapon, Reĝ' Robert' krucigis la manojn sur la brusto, kaj respondis: «Plej bone scias vi; la pekoj miaj kvazaŭ skarlatataj estas. Ho, permesu ke mi foriru el ĉi tiu loko; en pentlernej' monaĥa, nudpiede sur tiuj ŝtonoj pavimentaĵoj vojon

al la ĉiel', marŝadu ĝis animo
la mia kulpa estos pardonita!»

Ridetiĝis la Anĝel', kaj de l' vizaĝo
briligis tutan lokon sankta lumo,
kaj tra fenestro malfermita, laŭte
aŭdiĝis kanto el kapel' proksima:
«Demetiĝis li de seĝo potenculojn,
kaj ankaŭ humilulojn li altigiĝis!»
kaj tra la kant' alia melodio
leviĝis kvazaŭ puls' de unu kordo:

«Anĝelo estas mi; vi estas Reĝo».

Roberto, kiu staris apud trono,
okulojn levis; jen, li estis sola,
vestita kiel en antaŭaj tagoj
per la mantel' ermena kaj oraĵoj.
Kaj kiam venis liaj korteganoj,
troviĝis li sur planko genuanta,
en preĝ' silenta tute absorbata.

El angla lingvo tradukis

LOUISE BRIGGS

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Madrigalo

Dolĉa knabino mia,
je karesaj rigardoj malavara:
se via frunto klara
kaj figur' harmonia,
se viaj ĉarmoj kaj belec' magia
ne igus vian amon senkompara,
certe ĝi estus tia
kiam via rigard', tiel bonfara,
pro nia am' pasia
kun tia brilo ardas al mi kara!

JAUME GRAU

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

La Kavaliro de la Verda Surtuto

(El la verko «Lecturas Españolas»)

KIAM Don Kihoto alvenis antaŭ la domo de l' kavaliro de la Verda Surtuto, li estis tre kontenta; li ĵus plenumis unu el plej grandaj aventuroj el sia vivo: tiun de la leonoj. Sur la sojlo atendis Don Diego 'n — eble iom maltrankvilaj de l' prokrasto — Doña Cristina kaj Lorenzo. Doña Cristina estas la edzino de Don Diego; Lorenzo estas lia filo. Doña Cristina troviĝas en tiu aĝo kiam la virinoj revigas la lerneajn bubojn; eble ŝi havas mentoneton kiu delikate faldiĝas sur la mallarĝa kolumo de la jako; eble en ŝiaj okuloj sidas tiu nedifinita melankolio, tiu dolĉeco, tiu sopiremo kiun vi posedas, miaj bonaj amikinoj, tuj adiaŭontaj la frenezan aĝon. Lorenzo, ŝia filo, estas absurda kaj imagema knabo; Cervantes diras ke lia patro neniel sukcesis al li studi ĵuron; tio gajnas al li nian plej varman simpation. Cervantes aldonas ke lia patro ankaŭ ne povis atingi, ke li laboru en la teologio; tio ĉi liveras al li pli arde nian estimon.

Doña Cristina kaj Lorenzo staras ĉe la pordo de la hejmo; iu servisto, ĵus antaŭ momento, sciigis, ke tra la fino de la mallarĝa strato venas Don Diego akompanata de alia stranga sinjoro; Doña Cristina kaj Lorenzo, aŭdinte la novaĵon, malsupreniris rapide. Kaj jam Don Kihoto staras antaŭ ili; ili ambaŭ estas plenaj de profunda mirego; eble, tumulto de knaboj, ilin sekvintaj tra la stratoj de la vilaĝo, ĉirkaŭas la grupon; eble estas ke tiuj bonaj maljunulinoj, neniam ion farantaj, elŝoviĝis tra la fenestretoj tiucele lokitaj sub la larĝaj tegmentorandoj, kaj ke kelkaj sinjoroj najbaroj elaperis, ĉe la sojlo de siaj domoj, kun siaj rondaj ĉapeloj kaj la maldekstra mano sur la preniloj de la spadoj. «Kiu estas — ili pensas — tiu stranga viro kiun venigas Don Diego kaj kiu surportas duonan armvestaĵon, ŝildon kaj longan lancon?» Dume, Don Diego desaltas, ridetanta, de sia ĉevalo kaj diras, turnante sin al Doña Cristina kaj montrante Don Alonso 'n:

— Akceptu, sinjorino, kun via kutima afableco, sinjoron Don Kihoto de la Manĉo, ĉar tiu staras antaŭ vi, migranta kavaliro, kaj la plej kuraĝa kaj plej saĝa kiun la mondo entenas!

Don Alonso, kiam Don Diego eldiris tiujn vortojn, klinas sin kun profunda ĝentileco; Doña Cristina mallevas la kapon kaj ridetas per unu el tiuj facilaj ridetoj, kiuj estas, miaj bonaj amikinoj, via propraĵo, kaj kiuj nin konfuzas iomete ĉar ni nescias ĉu ilin naskas la naiveco aŭ la ironio. Kaj kio ajn ĝi estas, certe, post prezentado ankaŭ al Lorenzo, ĉiuj penetras en la domon. Cervantes zorgis ja diri al ni ke tiu domo estas larĝa, komforta; en ĝi estas ampleksa korto, vinkelo kun sia elpremejo kaj kaverno; apud la muroj, laŭ bela kaj simetria ordo, sidas rondaj kruĉegoj, produkto de la famaj

potfarejoj de El Toboso. Don Kihoto, dum momento, antaŭ tiuj kruĉegoj, pro natura kunrilato de ideoj, rememoras Dulcineo'n; Sanĉo, pli praktika, malpli idealista — ne riproĉu lin pro tio — eble nur pensas pri la bongusta manĉa likvoro. Poste ĉiuj trairas la pordon de la ĉambrego; ĝi estas la ĉefa parto de la domo. Oni vidas en ĝi ŝrankon kun plezurigaj kaj instruaj libroj, pentraĵojn — kies helaj koloroj ne estas ankoraŭ vualitaj de la oksidaĵo kiu hodiaŭ ilin malheligas, — kelkaj speguloj, tablo el ebono aŭ mahagono, larĝaj brakseĝoj kun remburitaj sidloko kaj dorso. Don Kihoto demetis sur unu el tiuj seĝoj sian kaskon kun majesta afekteco. Ĉiuj lin rigardis silente, mirigite; ĉe la pordo unu el tiuj servistinoj tiel bone konataj de Cervantes (kiel Argüello aŭ la Gallega el la *Ilustre Fregona*) malfermas la okulojn mirante; Lorenzo kaj Don Diego interparolas mallaŭte en angulo, kaj de tempo al tempo strabe alrigardas Don Kihoton.

— Sed, kiu estas tiu tiel stranga viro? — demandas Lorenzo al sia patro.

— Mi ne scias — respondas Don Diego. — Mi ne scias; iam li ŝajnas frenezulo, poste mi kredas lin la plej klera kaj saĝa persono, kiun mi iam rilatigis. Fine: mi ne povas diri ĉu li estas frenezulo aŭ saĝulo.

Kaj tie ĉi, en tiu hezitado de Don Diego, kuŝas la tuta ĉarmo, la tuta allogo, la tuta profunda mistero de tiu mirinda aventuro. Don Diego estas homo simpla, honesta, saĝa; en la domo oni spiras medion de trankvilo, de paco; la mebloj staras simetrie ordigitaj; ĉiuj aferoj ĉiutagaj estas farataj samhore; la manĝoj estas ĉiam pretaj kiam venas tagmezo kaj kiam venas la nokto; en la samaj momentoj malfermiĝas matene pordoj kaj fenestroj kaj oni vokas reeniron nokte; oni konservas kaj solenas ĉiujn festojn kaj familiajn okazaĵojn; la tablotukoj estas ĉiam senmakulaj kaj neniam oni rimarkos ŝirajon en la littukaro; la blanka tolaĵo estas zorge gardata en grandaj pinaj kestegoj en kiujn oni metas kelkajn cidoniojn kaj kelkajn odorantajn radikojn el junipero; en la provizejo kolektiĝas nutraĵoj kaj ĉiuspecaj frandaĵoj; la oleuoj estas plenaj de oleo; la vitra kestego de la pano aperas premlena de rondaj kaj orumitaj panbuloj. Kaj ia profunda silento, ideala silento, silento kiu pacigas al vi la nervojn kaj invitas al laboro, silento kiun Cervantes alnomas «mirinda» kaj pri kiu li diras ke ĝi estas tio kio plej multe surprizis Don Kihoton, regas en la tuta domo. Kaj tio estas kontrasto, kiu liveras profundan, gravan intereson al tiu paĝo. En tiu hejmo, tiu ĉi ordige-mo mem, tiu ĉi amo al metodo en ĉiuj tagaj aferoj, tiu ĉi solida honesto mem, silente ĝuata, naskas en ĝiaj loĝantoj intiman, mildan egoismon. Mi ne deziras ke vi malbone komprenu nun tiun vorton. Doña Cristina, Don Diego, Lorenzo estas perfektaj civitanoj; ili bone plenumas siajn devojn; lojale kondutas kontraŭ la amikoj; ili estas afablaj, diskretaj. Sed eble io elŝoviĝanta el la paca kaj kora medio de tiu domo surprizas ilin; eble ili ne povas toleri multimon, kontraŭsencon, impetaĵon, frenezan kaj malavaran agon, kiu subite faligos nian tutan ĉiutagan metodon, ĉiujn niajn etajn voluptaĵojn, ĉiujn niajn antaŭvidojn, nian tutan prozecan logikon. Kaj jen: vi

komprenas kiel fortegan emociion estas kaŭzonta en tiu ĉi hejmo de la kavaliro de l' Verda Surtuto la enveno de tiu stranga persono de la Malgaja Figuro? Don Kihoto havas nek planon, nek metodon; li estas paradoksulo; neniel lin koncernas la sociaj konvenaĵoj; li ne timas ridindecon; li ne obeas logikon en siaj ideoj nek en siaj faroj; li marŝas hazarde; malŝatas la monon; li ne estas antaŭzorgema; li ne atentis la malgravajn aferojn de la mondo. Kia estas tiu mirinda homo? Kiu estas lia koncepto pri la vivo kaj kion celas li tiamaniere vagante tra la vojoj?

Don Diego ne scias tion; li ne sukcesas decidi kio fakte estas tiu kavaliro kiun li enkondukis. Ĉu li estas frenezulo? Ĉu li estas saĝulo? La konflikto ĵus vekigis en tiu ĉi domo; jam la du formoj de la spirito — tiu kiun reprezentas Don Kihoto kaj tiu kiun simbolas Don Diego — troviĝas en kontraŭstaro. Kiuj estos la sekvoj? La batalo solviĝos en la animo de juna Lorenzo. Lorenzo staras sendecida: li amas la poezion, la idealon, la malprecizajn kaj romantikajn malproksimaĵojn, la nekonataĵon, la ĥimeron; Don Diego, lia patro, ne povis lin konduki al pli profitaj kaj solidaj esploroj; sed ĝis nun liaj fervoroj, liaj ŝatoj, liaj tendencoj estis subpremitaj, moderigitaj de la paca kaj orda enaero de tiu ĉi loĝejo; eble pli poste, elrevigita el siaj ĥimeroj kaj revoj, li estus iĝinta bonega terkulturisto aŭ laborema komercisto. Kaj subite aperas en la domo tiu absurda Don Alonso Quijano. Lorenzo kaj Don Kihoto havas vivan interbabiladon; Lorenzo legas siajn poeziaĵojn al la migranta kavaliro.

— Vivu la ĉieloj! — kriis entuziasme Don Kihoto, — vivu la ĉieloj, ĝentila knabo, ke vi estas la plej bona poeto el la mondo!

Jam la batalo estas perdita, aŭ, se vi volas, gajnita. Lorenzo ne fariĝos terkulturisto nek komercisto. Kaj mi demandas al vi, miaj amikinoj, bonaj amikoj: kion vi opinias pli grava por la pligrandigo kaj famigo de la nacio: tiuj spiritoj solecaj, vagantaj, imagemaj kaj idealon persekutantaj aŭ tiuj aliaj prozecaj, metodaj, respektemaj al la tradicioj, amantoj de la leĝoj, aktivaj, laboremaj kaj honestaj, komercistoj, industriuloj, metiistoj kaj plugistoj?

Ni sentu koran simpatian al la unuaj; sed, samtempe — kaj tiu estas la homa kaj eterna antinomio kiun Cervantes pentris, — ni sopiru la posedon de malgranda rento, de ia butiketo aŭ vinbergardeno.

AZORIN

El hispana lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

Bibliografio

COURS RATIONNEL ET COMPLET D'ESPERANTO. — Eldonita de «Fédération Espérantiste Révolutionnaire», 23 bis, rue Morère, Paris. Prezo: 5 fr.

Bonega libro el 208 paĝoj, unu el la plej bonaj lernolibroj de Esperanto. Ĝi enhavas antaŭparolon de la fama Henri Barbusse; skizon pri la historio de nia lingvo; trafajn klarigojn por refreŝigi la scion pri gramatiko; 17 lecionojn kun gravuraĵoj kaj ĉiuspeciaj ekzercoj; komplementan parton el 12 ĉapitroj pri la francaj parolturnoj kaj idiotismoj; esperantan-francan vortaron kaj francan-esperantan.

LA LASTAJ TAGOJ DE D-RO L. L. ZAMENHOF kaj la Funebra Ceremonio. Eldonis Adolfo Oberrotman kaj Teo Jung. Kolonjo-Horrem (Germanujo).

Tre interesa libreto kun 11 ilustraĵoj pri la ceremonio de la enterigo de nia Majstro kaj kortuŝantaj sciigoj pri la lastaj tagoj de lia vivo. Ankaŭ enhavas tiu ĉi funebre prezentita eldonaĵo kelkajn bonajn versaĵojn de samideanoj Leo Belmont, Julio Baghy kaj Feliks Hiller. Je la fino estas alvoko al tutmonda monkollekto por monumento al D-ro L. L. Zamenhof, por kiu oni destinas la profiton de la vendado de tiu libro, kiun ĉiu esperantisto devus posedi.

AMO PER PROVERBOJ. — Unuakta komedio de Arthur Azevedo, tradukita el la portugala lingvo de A. Couto Fernandes. Eldonis: Oskar Ziegler & Co. Marktredwitz (Bavarujo). Prezo: 3 respondkuponoj.

Belega kaj tre sprita komedieto, en kiu fraŭlego amindumas vidvinon kaj esprimas sin en ĉiuj okazoj nur per proverboj. Ili estas konataj esperantaj proverboj aŭ tradukitaj el la portugala lingvo tre lerte kaj gracie. Stilo tre korekta.

PARVA GRAMMATICA INTERNATIONALIS IDIOMATIS «ESPERANTO» CUM GLOSSARIO ESPERANTO-LATINO. Aŭtoro: Sac. J. Bianchini. Kolekto de «L'Esperanto» eldonata de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo: 1 liro.

40-paĝa broŝuro kun gramatiko el sep klaraj kaj mallongaj lecionoj kaj vortareto esperanta-latina. Interesa verko kiu trafe montras Esperanton al konantoj de la latina lingvo. Okaze de ĝia eldono oni iom parolis sur la esperantaj gazetoj pri la malsama prononcmansiero de la latina lingvo ĉe diversaj popoloj. Oni kritikis la aŭtoron tial ke li, en la parto «De alfabeto et pronunciatione», neĝuste klarigas la esperantan prononcadon. Fakte, okazis nur ke la aŭtoro sinjoro Bianchini faras tion laŭ la sonoj de la latina prononco ĉe la italoj, kaj la kritikintoj apartenas al aliaj landoj, kie la latina prononco estas diferenca.

POSTRIKOLTO. — Suplemento al la fama libro «El Parnaso de l' Popoloj» de Antoni Grabowski. Broŝuro eldonata de S-ro Julio Mangada Rosenörn, San Lucas, 5, Madrid.

Ĝi enhavas 22 valorajn tradukojn de versaĵoj el diversaj lingvoj. Ni ĝojas la aperon de tiu broŝureto, sed bedaŭrinde ĝia tro simpla formo ne estas inda je la altaj meritoj de la fama ĵus mortinta poeto.

ĈU LA KULTURITAJ NACIOJ BEZONAS KRISTANISMON? Mediteroj notitaj de H. Salokannel. 16-paĝa broŝuro eldonita de O. I. Movado A. B. Kasarmink, 20. Helsinki (Finnlando). Prezo: 2 Fmk. Vendata por la bono de blindaj esperantistoj.

Troviĝas je la fino de la verko la Granda batalhimno de D-ro Lutero.

NACIA EKSPOZICIO DE BRAZILIO, MEMORIGA DE LA 1^a CENTJARO DE LA SENDEPENDECO. — Prospekto de la eksterlanda fako de tiu Ekspozicio, kiu estas okazonta de 7 Septembro ĝis 15 Novembro 1922.

Riĉa kaj bele ilustrita eldono de la Ministerio de Justeco kaj Enlandaj Aferoj, kun nur esperanta teksto. — J. G. C.



Brita Kongreso en London

La Ciuvara Kongreso de Britaj Esperantistoj okazos en London (por la unua fojo) je Pentekosto 1922. La Organiza Komitato atendas grandan sukceson kaj pretiĝas por la gastigo de almenaŭ mil kongresanoj. Oni ankaŭ esperas, ke multaj samideanoj venos el aliaj landoj por partopreni la feston, kiu okupos kvar tagojn (de la 2^a ĝis la 6^a de Junio) kaj estos la plej granda kaj grava nacia kongreso de Esperantistoj ĝis nun okazinta en Britujo.

E. K. Edmonds (S-no), Hon. Sekr.,
«Rockwood», High Road, Wembley.

Brita Literatura kaj Debata Societo

LITERATURAJ KONKURSOJ 1922

Premioj por ĉiu konkurso : 1^a premio 30 ŝ. 2^a premio 20 ŝ.

1. Traduko de Angla Literaturaĵo. De 2000 ĝis 3000 vortoj.
2. Originala Novelo. De 1000 ĝis 2000 vortoj.
3. Originala Poemo. Ne pli ol cent linioj.

Kondiĉoj :

1. Konkursantoj, se membroj de la Societo, devas pagi 1 ŝ. por ĉiu manuskripto; se nemembroj, 2 ŝ. por ĉiu manuskripto.


2. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kiu aperos sur la manuskripto. Ili devas skribi la nomon kaj adreson — kune kun la pseŭdonimo—sur aparta folio, kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skribante la pseŭdonimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto.

3. Ĉiuj manuskriptoj fariĝos la propraĵo de la B. L. kaj D. S. La Komitato de B. L. kaj D. S. rezervas al si ĉiujn rajtojn pri publikigo de manuskriptoj.

4. La Komitato de B. L. kaj D. S. rezervas al si la rajton, aŭ ne doni aŭ dividi iun ajn premion. Se manuskriptoj de sufiĉa merito estos ricevitaj, medalo aŭ medaloj estos ankaŭ aljuĝitaj.

5. Manuskriptoj devas atingi la sekretarion antaŭ Februaro 28a, 1922.


Hon. Sek.: *Charles H. Edmonds,*
«Rockwood», High Road, *Wembley.* Anglujo.



EN LA PROKSIMA NUMERO

F A B E L O S E R E N A

en ritma prozo, katalune verkita de Victor Català, trad. Josep Grau Casas.



EKSTERLANDA MOVADO

La Parlamento de Finnlando duafoje voĉdonis subvencion de 25.000 finnaj markoj por la nacia Esperanto-Asocio. Dum la debato de la propono, parolis favore prof. M. Svininen, ĉef-direktoro de la administracio por publika instruado, kaj prof. R. Erich, ĵus estinta delegito de Finnlando ĉe la Ligo de Nacioj.

— En la Universitato de Lille s-ro prof. Vanverts, dekanano de la medicina fakultato kaj korespondanta membro de la medicina akademio, multe propagandas nun Esperanton per artikoloj en medicinaj ĵurnaloj.

— En Naĝoĵa (Japanujo), en la VIII^a Nacia Kolegio s-ro Ŝ. Iŝiguro paroladis pri Esperanto antaŭ 500 studentoj. Tuj komenciĝis vere grandioza kurso kun 356 studentoj, kiu finiĝis la 29 sept. Nun fondiĝis Naĝoĵa Esp. Asocio kaj Studenta Societo en la nomita Kolegio.

— La 6 dec. senatano Lafontaine, delegito de Belgujo en la Ligo de Nacioj, faris en Genève paroladon pri Esperanto en la Ateneo sub la protekto de la Komitato Ernest Naville kaj sub la prezido de s-ro Paul Morriand, dekanano de la ĵura fakultato de la Universitato.

— Oficiala kurso de Esperanto estas farata de prof. Cart en la Supera Komerca Lernejo en la «Sorbonne» de Paris.

— La prezidanto de la Brazilia Respubliko sankciis la Parlamentan rezolucion, per kiu Brazilia Ligo Esperantista estas konsiderata kiel societo de publika utileco. Li promesis sian helpon al la propagando de Esperanto kaj precipe al ĝia instruado en la publikaj lernejoj.

— Ĉe la Reĝa Instituto Naŭtika de Bari (Italujo) komencis kurson Prof. A. Lacalendola.

— Depost Januaro Esperanto estas enkondukita kiel laŭvola fako en la progresiga lernejo de la blindul-instituto Nürnberg, kie direktoro Reiner mem instruas laŭ la porblindula lernolibro de Borel.

— En Cluj (Rumanio) estas aranĝita dusemajna propaganda ekspozicio, sub la protekto de l' transsilvania eminentularo. Je la oficiala malfermo parolis S-ro V. Morariu, ŝtata poŝtinspektoro, kaj la Ministro d-ro Mihali.

— Dum la venonta Pasko okazos en Genève grava Internacia Konferenco por Instruado de Esperanto en Lernejoj, kunvokita de la Instituto Jean-Jacques Rousseau. Diverslandaj pedagogiaj gazetoj reprenis la oficialan programon de la konferenco, kiu elvekas grandan intereson en instruaj rondoj. La Brita Espe-

ranta Asocio, tre imitinde, starigis apartan komitaton kaj specialan kason por helpi la vojaĝon de britaj instruistoj.

— *The Esperanto Service Corporation* estas starigita de kelkaj amikoj de la esperanta movado en Nordameriko. Esperanto-Servo Korporacio estas pure komerca entrepreno, celanta disvastigi kaj popularigi la internacian lingvon en Usono, sed precipe provanta utiligi Esperanton al tiuj personoj, kies afero aŭ intereso havas internacian amplekson. Ĝis nun estas signitaj 2800 dolaroj por la kapitalo.

— En Bulgarujo estas oficialigitaj ŝtatinstruistoj de Esperanto en 29 realaj gimnazioj, kiuj instruos Esperanton dum la nuna jaro. Laŭ nova leĝo, la instruado de nia lingvo estos fakultativa en la realgimnazioj depost la lernojaro 1922-23.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA. — La holandaj samideanoj G. Seŭbring kaj R. Stoeltje, kiuj bicikle veturas tra la mondo, restadis en Barcelona de la 24. Decembro ĝis 1. Januaro. Ili vizitis kelkajn el la Barcelonaj grupoj kaj ankaŭ la sidejon de K. E. F. En ĝia festosalono, la 29. Decembro vespere, S-ro Seŭbring faris interesan paroladon pri iliaj spertoj dum la vojaĝo kaj pri la esperanta movado en la landoj kiujn ili trairis; fine li dediĉis laŭdajn frazojn al la esperantistoj en nia lando. Unu el ĉi tiuj danke respondis, dezirante al la kuraĝaj biciklantoj plej bonan daŭrigon de ilia eksterordinara vojaĝo. Kiam la du nederlandaj samideanoj forlasis Barcelonon, ilin adiaŭis, krom multaj esperantistoj, pli ol cent biciklistoj el «Sport Ciclista Català» kaj eĉ oni akompanis ilin dum kelkaj kilometroj.

— En la grupo «Barcelona Stelo» okazis agrabla festeto, la 21. Januaro, honore al ĝiaj anoj Artur Domènech kaj Jaume Grau, premiitaj en la Floraj Ludoj. La grupanoj prezentis la komedion «Tie ĉi oni parolas Esperante» kaj la katalunan adaptaĵon «L'Esperanto sense professor». La improvizitaj geaktoroj ludis sufiĉe diskrete siajn rolojn, precipe la fraŭlinoj Tresina Llop, Paquita Martí, Montserrat Grau, Angelina Domènech, Consuelo Serra kaj Paquita Burnat. S-roj Domènech kaj Grau legis siajn premiitajn versaĵojn. Fraŭlino Paquita Martí kaj S-roj Gilaberte kaj Costa tre bone ludis pianon kaj violonon. En la loĝioj vidiĝis gesamideanoj de ĉiuj Barcelonaj grupoj, kies ĉeesto pliagrabilis kaj sukcesigis la feston.

ANGLÉS. — Sub la gvidado de la malnova samideano S-ro Feliu, baldaŭ estos fondata nova grupo en Anglès. Por vekti la intereson de la loĝantaro, okazis la 8. de Januaro tre grava propaganda festo. En la domo de la publikaj lernejoj, kun ĉeesto de la Urbestro kaj aliaj aŭtoritatuloj, de kelkaj instruistoj kaj de la tuta infanaro kaj junularo de la vilaĝo, faris propagandajn paroladojn S-roj Domènech kaj Font Giralt, el Girona, kaj Gili Norta kaj Grau, el Barcelona. La kvar parolantoj priparolis la temon el ĉiuj vidpunktoj, atentante ĉefe pri la konveno ke Esperanto estu instruata al la infanoj, tiel grandnombre ĉeestantaj. Multaj entuziasmoj espereble aliĝos la fondotan Grupon. Je la fino oni kantis la himnon.

Ĉeestis tiun propagandan viziton kelkaj gesamideanoj el Girona. Oni faris komunan tagmanĝon kaj oni ekskursis al la bela loko «El Pasteral».

VENDRELL. — La grupo «Frateco» elektis novan konsilantaron, jene: Prezidanto, S-ro Salvador Martorell; Sekretario, F-ino Herminia Romeu; Kasisto, S-ro Ramón Bassa; Bibliotekisto, F-ino Dolors Ramón; Voĉdonantoj, F-inoj Maria A. Toldrà kaj Angelina Martorell.

Oni malfermis novajn kursojn al kiuj partoprenas kelkaj ĝenerantoj, klarigatajn de F-ino Maria Julivert.

La 23. Decembro ni ricevis viziton de la holandaj samideanoj Seŭbring kaj Stoeltje. Ili estis salutataj de la urbestro. Ni akompanis ilin viziti la Preĝejon, la Popolbibliotekon, kelkajn societojn kaj fine la domon de nia fama kataluna poeto kaj dramisto Angel Guimerà, pri kiu ni multe parolis, ĉar ili tre bone konas kelkajn el liaj plej gravaj verkoj. Vespere ni kunvenis en la grupa sidejo kie ambaŭ samideanoj rakontis siajn vojaĝajn impresojn.

«El Baix Penadès» raportas pri esperantaj aferoj. — S. E. *Delegito*.

TERRASSA. — La grupo «Lumon» festis sian transloĝiĝon la 29. de Januaro. S-roj Chaler kaj Oliart raportis pri la kreskiĝo de la grupo kaj la prospero de la esperanta movado en Terrassa. S-ro Solà faris longan kaj tre belan paroladon en esperanto, por kuraĝigi la samideanaron. Kelkaj ĝeinfanoj (unu el ili, aŭstra infanino) deklamis esperantajn versaĵojn kun granda ĉarmo kaj gracio. Ĉeestis multaj samideanoj el Sabadell kaj Barcelona. Tre bela kaj ĝojiga festo.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Egipta Esperantisto	Nova Tempo
Le Monde Espérantiste	Literaturo
Esperanto-Praktiko	Bulgara Esperantisto
Belga Esperantisto	Ladina Patrujo
La Marto	The British Esperantist
La Semisto	Nederlanda Esperanto
Germana Esperantisto	La Verda Ombro
Hispana Esperantisto	Amerika Esperantisto
Katolika Mondo	Espero Teozofia
Espero Katolika	L'Esperanto
Kristana Espero	La Revuo Orienta
Verda Utopio	Arguso
Vegetarano	Brazila Esperantisto
Esperanta Finnlando	Oficiala Gazeto Esperantista
La Esperantisto	Ĉeĥoslovaka Gazeto
La Laborista Esperantisto	Nova Eŭropo
Nova Tagiĝo	La XIII ^a
Hungara Esperantisto	Agitanto
Esperanto Triumfonta	Bizantio
Bulletin de la Société Française pour la propagation de l' Esperanto.	La Espero
Internacia Pedagogia Revuo	Sennacieca Revuo
	Esperanto (U. E. A.)

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.



III^A OFICIALA
FOIRO DE SPECIMENOJ
I^A INTERNACIA
BARCELONA



OKAZOS DE LA 15^a ĜIS 25^a MARTO 1922



Por ĉiuj informoj oni sin turnu al K. E. F. aŭ al la oficejo de la Foiro

PLAZA ANTONIO LÓPEZ, 15
BARCELONA